







№ 01
1970

G.L. GHELLI

ITALIA

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti

ferroviista



COMUNICATO DEL CASSIERE

Ancora molti dei nostri Soci non hanno versato la quota per l'anno 1970. Non avendo ricevuto avviso di dimissioni dovremo rinnovare e quindi pagare, alle Associazioni di cui siamo aderenti, le quote per i Soci degli anni scorsi, per cui preghiamo vivamente tutti di inviare le quote oppure due righe di dimissioni. Per agevolare il versamento delle quote sociali si allega il bollettino di versamento nel C.C.P.n°8/24094 intestato all'I.F.E.A., Via Donato Creti, n-ro 61 I-40128 BOLOGNA.

Le quote sociali per l'anno 1970 restano:

- Associazione all'IFEA, all'IFEF, alla FEI ed all'UEA con abbonamento alla rivista mensile "L'Esperanto-FEI": £. 2500,- annue.
- Associazione solamente all'IFEA ed IFEF (per quei Soci che pagano le quote di associazione alla FEI ed all'UEA direttamente o tramite i Gruppi Esperantisti locali): £. 1000,- annue.

Si pregano vivamente i Soci che non hanno ancora pagato le quote sociali per l'anno 1969, e continuano a ricevere il bollettino, di trasmettere con ogni urgenza le quote 1969 da noi già versate alle Associazioni di cui siamo aderenti, oppure trasmettere le loro dimissioni per non pagare, anche per il 1970, le loro quote alle suddette Associazioni.

SOSTENETE LA NOSTRA ASSOCIAZIONE! VERSATE IMMEDIATAMENTE LE QUOTE 1970!
ADERITE ALL'I.F.E.A.!

22-a KONGRESO DE LA INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO "IFEF"

RIMINI (Italia) de sabato la 16-a ĝis vendredo la 22-a de majo 1970-a
Sub la aŭspicioj de F.I.S.A.I.C. kaj de DOPOLAVORO FERROVIARIO.

KONSTANTA ADRESO: 22-a IFEF-KONGRESO, Via Donato Creti, 61 = I-40128 BOLOGNA (Italia). Post la 1-a de majo 1970-a oni devas adresi ĉe D.L.F. Viale Regina Margherita, 109 - I-47037 RIMINI (Italia)

Poŝtkonto: N-ro 8/24094 de IFEA, Via Donato Creti, 61 = I-40128 BOLOGNA.

Bankkonto: C/C n-ro 02486 de D.L.F. ĉe BANCA NAZIONALE DELLE COMUNICAZIONI, Via Rizzoli, 20 = I-40100 BOLOGNA. Notu bone la n-ronde Bankkonto!

Kongresejo: Teatro Novelli aŭ Palazzina dell'Azienda Autonoma di Soggiorno

I N F O R M A B U L T E N O

Kongresaj kotizoj: Kongresano: Post la 31-1-1970 ĝis la 30-4-1970: £.6000.

Familiano-Pensiulo-Junulo ĝis 21-jaroj: pagas la duonon. Simbola aliĝo: (Simpatianto kiu ne vizitas la Kongreson) minimume £.1000.

Tuj post la kongreso li ricevos la kongresajn dokumentojn.

LA KONGRESKOTIZO NE ESTAS REPAGEBLA!

Glumarkoj: L.K.K. pretigis kvinkolorajn glumarkojn kiuj simboligas la kongresa-urbon, Esperanton kaj fervojon, pere de skizita velo sur maro kaj fluganta rado sur verda kvinpinta stelo. La prezo estas, po folio de 4 ekzempleroj: 50 italaj liroj plus sendkosto.

Statistiko de la aliĝintoj ĝis la 7-a de februaro: Aŭstrio 18, Britio 4, Bulgario, 93, Ĉeĥoslovakio 5, Belgio 2, Danlando 12, Francio 56, Germanio 63, Hispanio 31, Hungario 47, Italio 54, Jugoslavio 1, Kanado 2, Nederlando 14, Norvegio 7, Pollando 21, Rumanio 12, Svedio 14, Svislando 10. Entute 466.

P R O V I Z O R A P R O G R A M O

Vendredon la 15-an de majo: Gazetara konferenco.

Sabaton la 16-an de majo: Alveno de la Kongresanoj.

Kunsido de IFEF-Estraro kun L.K.K. Interkona vespero.

Dimanĉon la 17-an de majo: Diservo. SOLENA MALFERMO DE LA KONGRESO. Fotografado. Libera posttagmezo. Internacia balo.

Lundon la 18-an de majo: H.8, 30 Estrara kaj Komitata kunsido (nepublika) H.10, 30 Estrara kaj Komitata kunsido (publika). H.14 Duontaga ekskurso al San Marino kaj vizito de Rimini kaj ĉirkaŭaĵoj. Libera vespero.

Mardon la 19-an de majo: H.9, - Terminara kaj Junulara komisionoj. H.11, - Statuta kaj Fakprelega komisionoj. H.15, - Fakprelegoj kaj Filmoj. H.20,45 Teatra vespero.

Merkredon la 20-an de majo: H.10, - Plenkunsido. Filmoj. Piedpilka ludo. Junularaj aranĝoj. H.20,45 Folkloro vespero.

Ĵaŭdon la 21-an de majo: Duontaga ekskurso al Ravenna. Fermo de la Kongr. Vendredon la 22-an de majo: Tuttaga ekskurso per vagonaro al Bologna kaj ĉirkaŭaĵoj.

ATENTU BONE PRI:

KOTIZOJ: Mi varme petas sendi la kotizojn al la adresoj de ni indikitaj: Poŝtkonto n-ro 8/24094 de IFEA, Via Donato Creti, 61 = I-40128 BOLOGNA. Bankkonto C/C n-ro 02486 de DLF ĉe BANCA NAZIONALE DELLE COMUNICAZIONI. Alie ni pagos procenton al aliaj bankoj kaj ni devas peti alian monon.

GLUMARKOJ: La glumarkoj estas tre belaj. Vi povas mendi ilin rekte al la adreso de LKK, Via Donato Creti, 61=I-40128 BOLOGNA. La kosto estas 50 italaj liroj po folio da 4 glumarkoj. Ekde 10 folioj senpaga sendo.

ALIĜILOJ: Ankoraŭ ni havas aliĝilojn disponeblajn: bonvolu peti ilin al ni aŭ al la landaj perantoj.

LA SEKRETARIINO DE L.K.K.

TEATRA PREZENTADO DUM LA 22-a I.F.E.F.- KONGRESO

La 19-an de majo, dum la Internacia Kongreso de Esperantistoj-Fervojistoj, la teatra trupo "Becherini-Filippetti" prezentos en Rimini duaktan dramon: "La floro nomata Circea", italan verkon kiu, pro sia aktuala scena evoluo jam akiris multajn kaj varmajn laŭdojn en la rondo de teatraj kritikistoj. Ĝin tradukis esperante, sindone kaj volonte, kelkaj niaj spertaj gesamideanoj.

La trupo "Becherini Filippetti", kies anoj, novbakitaj esperantistoj, jam sukcese prezentis itallingve famkonatajn teatraĵojn, en Bologna kaj en aliaj urboj, varme enamiginta pri esperanto, intencus fariĝi internacia teatra trupo, kun la celo diskonigi, en esperantan medion, la originalajn teatraĵojn de la itala verkisto Luigi Pirandello.

La aktuala reĝisoro de la trupo, S-ro Vincenzo Filippetti, kiu dum multaj jaroj ludis gravajn rolojn en la verkoj de Pirandello, estis amema lernanto de la italaj reĝisoroj Manlio Guardabassi kaj Mario Ravera. Vicreĝisorino, S-ino Domenica Becherini jam rolis plurfoje en naciaj teatraj trupoj.

Ĉiu trupano havas sian propran historion; ekzemple S-ro Giorgio Grisoni jam ludis, esperantlingve, en la "Revizoro" de Gogol dum la Universala Kongreso de Esperanto en Bologna dum la jaro 1955-a; S-ro Vincenzo Zacchioli, diplomita en la Bolonja teatra akademio de "Antoniano", dum sia junaĝo lernis Esperanton sub la gvidado de Kav. Giuseppe Zacconi. S-ro Carlo Nardini, poeto, kiu subtenos la rolon de la maljuna Ĝerardo, jam diligente plenumis la taskon de direktoro de scenejo en "La Revizoro". La scenejpretigisto Mario Brattella estis diplomita ĉe Bolonja akademio. La sekretariino, Laura Fava Rassek, estas Bolonja sperta pentristino.

La juna fraŭlino Daniela Tonnini, pro sia kapableco, en pluraj okazoj, jam sukcesis fariĝi sperta pri scenejpretigado. Cesare Tamburini ludis, dum longaj jaroj, altnivelajn teatrajn rolojn, sub la direkto de Luigi Meniello kaj de nia aktuala reĝisoro Filippetti.

Sed, kion diri pri tiu ĉi lasta kaj lia familio? S-ro Filippetti tiel amas nian lingvon, ke li kapablis konvinki ludi, en la teatraĵo "La floro nomata Circea", siajn du filinojn: Luisa Maria, komika aktorino, kaj Francesca, teatra kritikistino. S-ro Filippetti havas aliajn tri filojn kaj edzinon; venontajn jarojn eble nivos, ludantaj sur iu esperanta teatra scenejo, ankaŭ ilin: la tutan familion Filippetti.

NORMA ZACCONI

PARTOPRENU MULTNOMBRAJ AL NIA 22-a IFEF- KONGRESO!

"MIELA LUNO" EN RIMINI 1970

Konkurso por junaj geedzoj.

- 1) La Turisma Entrepreno kaj la Asocio de Hotelestroj organizas konkurson "MIELA LUNO" en Rimini. kiun rajtos partopreni ĉiuj junaj geedzoj, kiuj ne atingos la 35-an jaraĝon je la 20-a de majo 1970-a, bone parolas esperanton kaj ne gajnis en la pasintaj eldonoj de la konkurso.
- 2) La premioj konsistos el 10-tagaj senpagaj restadoj en unuaklasaj hoteloj de la marbordo de Rimini (Italujo). La restadperiodo estas fiksita de la 26-a de majo ĝis la 4-a de junio 1970-a. Dum la restado oni aranĝos apartajn festojn, ekskursojn kaj regalojn honore al la paroj.
- 3) La konkursantoj, plej malfrue ĝis la unua tagdeko de la venonta aprilo, devos sin anonci per letero aldonante la plej belan foton de la edzino kun edziĝan vesto aŭ foton de la paro kaj la daton de la geedziĝo.
- 4) Tiucela komisiono plenrajte selektos, juĝos kaj premios la parojn.
- 5) Oni adresu ĉion al la delegito de U.E.A. en Rimini: Albino Ciccanti - S. Bernardino, 26 = I-47037 RIMINI (Italio).

ZAMENHOFMONUMENTO EN ZWOLLE (NEDERLANDO)

En Zwolle, la ĉefurbo de provinco Overijssel en Nederlando, ni posedas belan bulvardon laŭlonge de urba kanalo kun la nomo "Zamenhof Singel".

Ni ricevis la permeson de la urbestro lokigi en parketo ĉe la fino de tiu bulvardo Zamenhof-(Esperanto) monumenton. La urbestro estas preta finance subteni nin sed... kondiĉe ke la internaciaj geesperantistoj montras sian intereson por tiu ideo per sendado de (iom da) mono por la monumento. La komitato konsistas el la jenaj personoj:

D-ro L.G. van Lookeren Campagne	Infankuracisto
A.N. de Kleine, hotelisto	U.E.A.- delegito
T. Blaauw - Interlanda kontaktulo	I.F.E.F.- membro
A. Eijkenaar - eksfervoĵisto	I.F.E.F.- membro

Mondonacojn vi bonvolu sendi al: GEMEENTELIJKE STORTINGSDIENST, ZWOLLE (ĝrnumero: 86 33 49) kun la aldono: "Por la Zamenhofmonumento", (kontonumero: 80 63 31). Listo kun la nomoj de la gedonacantoj aperos en la landaj esperanto-gazetoj. Ĉiujn korespondaĵojn pri la monumento oni sendu al: A. EIJKENAAR, Ruydaelstraat 13, ZWOLLE (Nederlando).

INTERNACIAN RENKONTIĜON DE ESPERANTISTOJ-NATURAMIKOJ "I.R.E.N."

En la suda landparto de Hungario, proksime de urbo Pécs (Peĉ), situas inter la nordaj deklivoj de la mezmontaro Mecsek (Meĉek) du mildaj valoj, havantaj sume kvin lagojn celantajn ripozadon kaj sportojn. En la okcidenta valo situas, apud la vilaĝo Abaliget, ĉe stalagmitgroto kaj du lagojn unuaranga internacia kampadejo kaj turista domo. De la jaro 1968 ĉi tie ĉiujare aranĝas la esperantistoj-naturamikoj de Pécs kaj de la departemento Baranya (Baranja): INTERNACIAN RENKONTIĜON DE ESPERANTISTOJ-NATURAMIKOJ "I.R.E.N." de la 18-a ĝis la 28-a de julio 1970-a.

La programo enhavas interesajn ekskursojn, trarigardon de la departemento kaj de la urbo, kiu havas naturajn kaj historiajn interesaĵojn. Okazos interesaj prelegoj, lumbildprezentadoj kaj amikaj vesperoj.

La-kotizoj estas malaltaj: dektaga restado en kvarlita kampadeja dometo aŭ en la turista domo kun trifoja manĝado tage, kaj la kostoj de ĉiuj ekskursoj, kaj distraĵoj programoj faras entute 890 Ft-ojn. En propra tendo 780, en dulita kampadeja dometo 990 Ft-ojn. Aliĝilojn sendas kaj informas per letere: Teritoria Esperanto Komitato Pécs 1. pf.2.

Grava informo: Post IREN la partoprenantoj povos facile kaj rapide vojaĝi al la 55-a U.K. okazonta de la 1-a de aŭgusto en Vieno.

BIBLIO KAJ ARKEOLOGIO

EN LA BIBLIA MUZEO DE ANTIKVAĴOJ EN AMSTERDAM, vi trovos modelojn kaj elfositajn objektojn kiu kondukos vin en la mondon de la Biblio: Palestino, Egiptujo kaj Babilonio.

Vi povos kompari tie la antikvan kun la moderna Israelo: vi vidos fotojn kaj bildojn pri ĝi kaj pri la trovaĵoj de la Mortmaraj rulaĵoj apud Qumran. Gvidado kun espliko en Esperanto. Adreso: Hemonylaan fronte al n-ro 19, Amsterdam-1008. Petu detalajn informojn ĉe Stadhouderskade, 137 Amsterdam (Nederlando).

12-a EŬROPA FERIOSEMAJNO EN SVISLANDO "E.F.S."

Respondaj funkciuloj de Sviza Asocio de Esperanto-Fervojistoj (SAEF) invitas gesamideanojn partopreni al 12-a "Eŭropa Feriosemajno en Svislando (EFS)", kiu efektiviĝos de la 23-a ĝis la 29-a de aŭgusto 1970-a en la ĉarma feriejo GWATT apud la lago de Thun. El la alloga programo nur estu menciitaj belegaj ekskursoj al la mondfama montarregiono Berna Oberlando kaj varioplenaj prezentadoj vesperaj. Du diversrangaj feriodomoj kun kvar-, tri- kaj ĉefe dulitaj ĉambroj estos je dispono kaj elstara kuirrejo zorgos por bonfarto de la gastoj. Fruatempa aliĝo estas rekomendinda, ĉar ĝis nun la disponeblaj ĉambroj ĉiujare elvendiĝis rapide.

Esperanto-geamikoj el ĉiuj landoj kaj profesioj, kiuj ŝatas pasigi je favora prezo senzorgajn feriotagojn en vere agrabla rondo, petu senhezite detalan prospekton ĉe la sekretario de S.A.E.F.:

S-ro Ernst GLÄTTLI, Laurstrasse 17, CH-5200 BRUGG (Svislando).

2-a INTERNACIA BALATONA ESPERANTO-FERIO

La Organiza Komitato invitas ĉiun esperantiston kun familianoj sen aĝlimo al la 2-a INTERNACIA BALATONA ESPERANTO-FERIO okazonta de la 17-a ĝis la 30-a de julio 1970, en banloko BALATONSZEMES, Hungario, ĵus antaŭ la 55-a Universala Kongreso! La programo enhavas: Interkonan vesperon. Prelegojn kun diapozitivoj pri Balatono, Hungario, Budapeŝto, k.t.p. Teatran prezentadon. Viziton al la loka Poŝta Muzeo. Ekskursetojn al la agrikultura kooperativo kun speciala hungara vespermanĝo subĉiela kaj vin gustumo. Distrajn programojn kaj dancadon. Surprizojn.

La loka kulturdomo estos je nia dispono dum la programoj kaj kunvenoj.

La kotizo por dusemajna aranĝo estas: 1050 hungaraj forintoj, kiu egalas al 35 us.\$-j. La kotizo por unu semajno estas 660 hungaraj forintoj.

Maten- kaj vespermanĝoj kostas 190 h.f. semajne. La kotizo enhavas abundan tagmanĝon, loĝadon, enirbileton al la strando kaj la tutan programon.

Atenton! Por la aliĝontoj el okcidentaj landoj, kiuj pagos 5 us.\$-jn ĝis la 30-a de majo, ni donas la eblecojn pagi la diferencon de la aliĝkotizo en hungaraj forintoj post la alveno.

2-a I.B.E.F. okazos ĵus antaŭ la 55-a U.K. Por la kongresanoj komuna vojaĝo certigite al Vieno! Konstanta adreso: HUNGARA ESPERANTO-ASOCIO - H.E.J. Budapest VIII, Kenyérmező utca 6.I. Bankkonto O.T.P.10.005-VIII-1 Budapest, Hungario.

55-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

WIEN (Vieno) 1 - 8 Aŭgusto 1970.

SUB LA ALTA PROTEKTADO DE D-RO FRANZ JONAS, PREZIDANTO DE AŬSTRUJO.

Aktuala diskut-temo. "Konflikto de generacioj: ĉu realaĵo aŭ preteksto?" estos la temo de la ĉi-jara kongresa debato.

Fakaj kunsidoj. 23 fakaj organizaĵoj aliĝintaj aŭ kunlaborantaj kun UEA mendis fakkunsidojn enkadre de la 55-a UK. Multaj el ili aranĝos sian kunvenon publike, t.e. kun ĉeesto de samfakaj specialistoj neesperantistoj.

Aliĝado. Ĝis la 12-a de januaro aliĝis entute 750 personoj el 37 landoj.

PAROLAS VARSOVIO.....

Radio Varsovio disaŭdigas en la internacia lingvo du ĉiutagajn duonhorajn programojn:

6,30- 7,- h. = 200 m., 25 m., 31 m., 41 m., 49 m.

16,30- 17,- h. = 31 m., 41 m. La horoj estas indikitaj laŭ la mezeŭropa tempo. ADRESO: Pola Radio, ESPERANTO-PROGRAMO, Varsovio, Pollando.

I. F. E. A.

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO

SIDEJO: DOPOLAVORO FERROVIARIO - BOLOGNA (Italujo)

SEKRETARIEJO: Via Donato Creti, n-ro 61 = I-40128 BOLOGNA (Italujo). Tele
fonnumero 35.90.71. C.C.Postale (Poŝtkonto) n-ro 8/24094.

-----oooOooo-----

J A R R A P O R T O 1 9 6 9 - a
=====

21. Landaj estraroj kaj funkciuloj

21.2.- ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO "I.F.E.A.", Via Donato Creti,
n-ro 61 = I-40128 BOLOGNA (Italujo).

PREZIDANTO: Prof-ro D-ro Inĝ. Bernardino LATTANZI DI MONTERUBIA-
GLIO, Via Sebenico, 2 ROMA.

VICPREZIDANTO: D-ro Inĝ. Giordano AZZI, Via G.Cesare, 20 COMO.

SEKRETARIO: P.i. Germano GIMELLI, Via D.Creti, 61 I-40128 BOLOGNA

VICSEKRETARIO: D-ro Antonio DE SALVO, Via Olbia, 15 I-00182 ROMA

KASISTO: S-ro Giulio CATENA, Piazza dell'Unità, 13 I-40128 BOLOGNA

KOMITATANO DE I.F.E.F.: P.I. Germano GIMELLI - BOLOGNA.

23. Evoluó de rilatoj kun instancoj kaj aùtoritatoj

23.1.- Kiaj estas la rilatoj al fervojaj instancoj? Bonegaj pere de DLF

23.2.- Kiaj estas la rilatoj al sindikatoj? Nun ni komencas kontaktiĝi
kun la Sindikatoj.

23.3.- Kiaj estas la rilatoj al FISAIC? Bonegaj pere de "Dopolavoro Fer-
roviario kiu elpas nin ĉiurilate. Gravan helpon D.L.F. donis, do-
nas kaj donos okaze de la organizo de la venonta IFEF-Kongreso.
La Itala Filio de FISAIC estas DLF kun kiu ni havas bonegajn ri-
latojn kaj ĉiutagajn kontaktojn. La centra oficejo de DLF en Romo,
interesiĝis por ke la IFEF-Kongreso kiu okazos en Rimini estu en
la oficiala programo de FISAIC kiel FISAIC-manifestacio.
La Prezidanto de D.L.F. en Bologna S-ro CECI partoprenis nian 21-an
IFEF-Kongresonen Avignon kaj alparolis esperantlingve dum la inaù-
gura manifestacio prezentante donacon de D.L.F.

21.2.1.- Por kiom da membroj vi kotizas al via landa FISAIC-sekcio?
Neniu ĉar la fervojistoj estas jam membroj de D.L.F. (Itala FISAIC-
sekcio).

23.4.- Kiaj estas la rilatoj al aliaj fervojistaj organizaĵoj (kulturaj,
artaj, libertempaj, sportaj)? Ni havas bonegajn rilatojn kun AEC
(Association Européenne des Cheminots) kiu ofte publikigas niajn
artikolojn en sia organo "Fereurop". La Eùropa Vicprezidanto D-ro
Inĝ. Gustavo de Rosa (kiu verkis fakprelegon por nia 22-a Kongreso)
kaj la tuta estraro de tiu Asocio petis pli viglan kontakton kaj
kunlaboron ne nur kun IFEA sed ankaù kun IFEF sur Eùropa kampo.
La sekretario de la Itala sekcio de AEC partoprenis, kune kun di-
versaj membroj kaj estraranoj, al nia Jubilea Kongreso en Varna
kaj alparolis esperantlingve la kongresanojn dum la inaùguro.
Ankaù la Eùropa Interamikiĝo de Staciestroj interrilatis kun ni
por starigi kontaktojn kaj kunlaborojn jam planitajn dum iliaj
Internaciaj Kongresoj.

23.5.- Ekzistas rilatoj al ne-fervojistaj organizaĵoj, kiaj? Jes. Bone-
gajn rilatojn ni havas kun Itala Esperanto Federacio "I.E.F." kaj
kun turismaj entreprenoj en Bologna kaj Rimini. Pere de niaj kle-
podoj la Provinca Turisma Entrepreno en Bologna eldonis
faldfolion pri la urbo en Esperanta lingvo, kaj la Restadeja Turi-
sma Entrepreno en Rimini eldonis Esperantan tekston por ĝia luksa
kaj bunta broŝuro.

24. Kunlaboro/rilatoj kun aliaj esperantistaj organizaĵoj

24.1.- Kiaj estas la rilatoj al via landa asocio de UEA? Kiam skribis an-
taùe la rilatoj kaj kunlaboroj kun I.E.F. estas bonegaj.

24.2.- Kiaj estas la rilatoj al via landa asocio aù grupo de SAT? Laù mia
scio en Italio ne ekzistas landa asocio aù grupo de S.A.T.

24.3.- Ĉu vi havas kontakton kun aliaj landaj esperanto-organizaĵoj? En Italio ĉiuj esperanto-organizaĵoj laboras en la kadro de "I.E.F." kaj ni kiel faka Asocio de IEF kunlaboras kun ĉiuj.

25. Informado en plej vasta senco

25.1.- Kiom da malfavoraj artikoloj aperis en viaj naciaj gazetoj? 2-3

25.2.0.- Kiom da artikoloj estas publikigitaj pro via interveno aŭ dissendo de informoj al la gazetaro? Proksimume 15 (inter kiuj multaj kiuj rilatas la venontan IFEF-Kongreson en Rimini.

25.2.01.- Kiom ofte vi uzis la kongresan gazetaran bultenon por verkado de viaj raportoj aŭ artikoloj? Plurfoje en nia informa bulteno

25.2.02.- Ĉu vi havas rimarkigojn rilate kongresa gazetara bulteno? Neniu

25.2.1.- Publikigo de fakaj prelegoj resp. resumoj

25.2.1.1.- Kiom ofte estas publicita la kompleta teksto de la fakprelego en Avignon en Esperanto- Fervojoj- Aliaj-revuoj? Neniu

25.2.1.2.- Same kiel supre, sed nur resume? La fakprelego de la Kongreso de Avignon estis publikigita esperantlingve en "Itala Fervojisto"

25.2.1.3.- Ĉu kiom da raportoj resp. notoj la fakprelegoj estas menciitaj? Esperanto-revuoj? n-ro 2 (L'Esperanto kaj Itala Fervojisto)

Fervojoj revuoj? n-ro 2 (Fereurop kaj Notiziario D.L.F.)

Aliaj? n-ro 1 (Esperanto-Cerri-Biella)

25.2.2.- Ĉu vi sendis informojn al fervojaj administracioj aŭ/kaj sindikatoj? Kiom? Ni sendas regule nian informan bultenon al dekoj da fervojaj aŭtoritatoj. Same al multaj Prezidantoj de D.L.F.. Ili ricevas la informojn. La ĝenerala direkcio presas propagandan brosuron esperantlingve. La Ĝenerala Direktoro mem akceptas partopreni en la Honora Komitato de la 22-a I.F.E.F.- Kongreso.

25.2.3.- Ĉu okazis aparta/speciala informado en la deĵorejoj? Jes, pere de D.L.F. kiu reklamas niajn kursojn kaj nian Kongreson.

25.2.4.- Kiom da radioprelegoj okazis? La loka radio en Bologna anoncas niajn esperantajn manifestaciojn kiam ni sendas gazetaran komunikon

25.3.- Ĉu vi organizis ekspoziciojn? Kunlabore kun la loka grupo en Bologna, okaze de la disdono de la diplomoj ni organizis malgrandan ekspozicion pri esperantaj libroj, gazetoj kaj broŝuroj. Ĉeestis pli ol 100 personoj.

25.4.- Kiom da afiŝoj, flugfolioj, prospektoj, k.t.p. vi dissendis, disdonis aŭ disvendis? Krom la afiŝoj elmontritaj en la deĵorejoj kaj stacidomoj, ni havas en la centro de multaj urboj montrofenestrojn en kiuj, precipe en Bologna, ni montras propagandilojn pri nia movado faka kaj ĝenerala. Dum la jaro, kunlabore kun la loka grupo, ni disdonas plurmilojn da nacilingvaj faldfolioj oportune presitaj por propagandi nia movado.

26. Junulara agado/aktiveco

26.1.- Kiel funkcias la kunlaboro de la junularo en kaj kun la landa estraro? Bonega

26.2.- Ĉu okazis apartaj junularaj aranĝoj? Ne.

26.3.- Ĉu la junularo ĝuas specialaj favorojn k.t.p.? Ne.

26.4.- Ĉu ekzistas kontakto kun ne-esperantistaj junularaj organizaĵoj? Kiel funkcias tiuj kontaktoj? Ne.

27. Varbado. Samkiel pasintjara raporto

101. Diversaĵoj. Multaj niaj membroj agas en la Kultura Sekcio de D.L.F. precipe en Venezia, Vicenza, Verona, Bologna kaj cetere.

102. Agado rilate staciestra ligo. Niaj membroj kiuj estas Staciestroj:

-Corradi Celso - Estro de Stacio CAMOGLI (Genova)

-Bettio Giuseppe - Unua Anstataŭanto de Estro de Stacio Venezia S.Lucia

-Tarlindano Spartaco - Manovra Staciestro en Stacio Venezia S.Lucia.

-Degli Esposti Gianleone kaj Sangiorgi Abele - Staciestroj en Bologna S.D.

Niaj simpatiantoj: Kav.Lorenzo Cecchetti, -Estro de Stacio Padova kaj Carlo Gugole Helpstaciestro en Verona estas funkciuloj en la Eŭropa Federacio de Interamikiĝo de Staciestroj. S-ro Gugole estas la Eŭropa Prezidanto de tiu Eŭropa Federacio.

Bologna, la 26-an de januaro 1970-a

LA SEKRETARIO DE I.F.E.A.
(p.i. Germano Gimelli)